Boulogne-sur-mer : ville mythique pour tout espérantiste qui se respecte. Ce congrès était destiné à la commémoration du premier congrès international qui s'était déroulé en 1905 en présence de Zamenhof. Lors de la cérémonie d'ouverture au théâtre municipal, lieu où s'étaient déroulées 100 ans auparavant les festivités, et en présence de Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, petit-fils du Doktoro Esperanto, a été lu le discours que prononça Zamenhof lui-même en 1905. Puis s'en est suivie une marche à travers la ville qui a amené les congressistes jusqu'à la place de la gare, celle-là même qui accueillit Zamenhof en 1905 et sur laquelle a été érigé un buste du créateur de l'espéranto. Après les discours officiels et les dépôts de gerbes, tout le monde s'est dirigé vers la mairie où un buffet froid avait été prévu.

C'est là que se sont retrouvés les membres de JEFO après un réveil tardif. On ne peut pas leur en vouloir après le travail effectué la veille : il en faut des provisions pour nourrir 500 espérantistes affamés pendant cinq jours de congrès ! Et les choses avaient été « organisées » dans les règles de l'art : un menu équilibré et varié différent chaque jour de congrès, un choix important de boissons et de sucreries. Pour satisfaire les clients, les vendeurs n'ont pas hésité à créer des sandwiches et salades à la demande : un sandwich jambon - beurre sans beurre mais avec des concombres, une salade végétarienne avec quelques morceaux de poulet... L'effervescence en cuisine était des plus vives à l'heure des repas, en particulier le soir. Mais le client n'étant pas toujours au rendez-vous, un plan de résistance s'est mis en place : le couloir entre la salle principale et la cuisine est devenue salle de rendez-vous des amateurs du jeu loup-garou. Installés en cercle, les joueurs ont vécu le congrès au rythme du village qui s'endort et se réveille,

déplorant régulièrement la mort de nouvelles victimes des affreux loups-garous.

Pendant ce temps, dans les différents salons du kongresejo se déroulaient de nombreuses conférences toutes certainement plus intéressantes les unes que les autres. Ce congrès était également le siège des assemblées générales et des réunions de travail des nombreuses associations présentes. Les congressistes sont allés faire leurs achats aux livreservos présents pour l'occasion, avec la sortie du nouveau « Tinĉjo en Tibeto ».

Les plus téméraires ont pu participer aux excursions organisées l'après-midi afin de découvrir les nombreux charmes de Boulogne-sur-mer : visite guidée de la vieille ville et de la colonne Napoléon érigée en l'honneur de l'empereur qui remit pour la première fois la légion d'honneur à Boulogne-sur-mer, visite commentée du port et du calvaire des marins ainsi que de la maison de la Beurrière présentant la vie quotidienne des marins boulonnais et leurs familles, excursion au site des Deux Caps où les congressistes ont pu découvrir la beauté du paysage de la Côte d'Opale. Enfin, une journée entière d'excursion en Angleterre était organisée, « sur la pašoj de Zamenhof » afin de réaliser le même voyage qu'avait effectué le créateur de l'espéranto en 1905.

Après tant d'efforts et un petit passage obligatoire à la sandviĉejo, les congressistes ont pu se reposer en admirant les spectacles prévus pour chaque soirée : aussi chacun a-t-il pu se reconnaître dans l'interprétation de « Stilekzercoj » de Henri de Sabates présentant des rencontres de la vie quotidienne dans un autobus. Le public a beaucoup applaudi la représentation de la pièce de théâtre « Familia Etoso », magnifiquement interprétée par la troupe de Toulouse. La soirée de dimanche était dédiée à la musique et la chanson avec la présence du fameux Jacques Yvart qui a interprété une partie de son répertoire, suivi par la chorale Meven venue de Bretagne présenter ses chansons et légendes d'inspiration celtique traduites en espéranto. Enfin, le public espérantiste a assisté aux danses et chants traditionnels du Boulonnais avec une reconstitution de la scène qui s'est déroulée en 1906 lors du congrès international de Genève, où une espérantiste boulonnaise coiffée de son Soleil traditionnel avait ouvert le bal au bras de Zamenhof.

Ces soirées se sont toutes terminées à l'auberge de jeunesse où, afin de ne pas perdre l'entraînement de la journée, les membres de JEFO ont participé à de nombreuses parties de loup-garou. Voilà ce qui peut être dit sur ce congrès un peu particulier qui risque de ne se reproduire que dans 100 ans pour le bicentenaire du premier congrès international d'espéranto à Boulogne-sur-mer!!

Historieto de la signolingvo aŭ la alia danĝera lingvo

Christophe Chazarein

Antaŭ kelkaj monatoj, en februaro 2005, la nacia asembleo allasis al la franca signolingvo (FSL) la statuson de oficiala lingvo en Francio. Al multaj, tiu decido ŝajnos normala sed ne grava – cetere oni apenaŭ komentis ĝin en la informilaro. Tamen, tiun decidon tre longe atendadis la surduloj (la nomo “surdmutulo” estas evitinda ĉar la plimulto de surduloj ne mutas). Malmultaj scias, kvankam tio aperas nekredbla, ke antaŭ nur 30 jaroj la FSL estis malpermesita en la francaj lernejoj! Kiel okazis tio?

La surduloj antaŭ la 18a jarcento

Se prahistorio estas la periodo antaŭ la apero de skribado, tiam oni povas iel diri ke la surduloj vidis la finon de sia prahistorio nur antaŭ iomete pli ol du jarcentoj. Efektive, estas en 1779 ke aperis Observoj de surdmutulo Pierre Desloges, la unua konata verkaĵo de surdulo. Pri la vivkondiĉoj kaj lingvo de la surduloj antaŭ la 18a jarcento, oni malmulte scias.

En la antikveco, la helenaj filozofoj Platono kaj Aristoto kredis, ke la racio ne povas esti sen la parolo. Konsekvence, iu kiu kapablas nek aŭdi nek paroli ne kapablas racii. Poste, saman diskurson reprenis la kristanaj teologiistoj, precipe sankta Aŭgusteno, kiu opiniis, ke surdeco malebligas fidon. En ĉiuj tempoj, la surduloj suferadis pro la kredo ke ili estas idiotoj.

Tamen, en Mezepoko la surdaj komunumoj disvolvigis en la eŭropaj urboj dank' al favoraj sociaj kondiĉoj. Surduloj estis en diversaj kampoj : laboristoj, metiistoj, plugistoj, buĉistoj... kaj eĉ religiistoj. Oni permesis al ili uzi siajn signojn por bapti, edziĝi, aŭ eldiri la monakan voton. Surdi ne malebligas esti inter la superuloj de la socio : oni konas ekzemplon de potenca surda familio inter la itala mezepoka burĝaro.

La lulilo de la tiutempa FSL estis en Parizo, tiam la plej vasta eŭropa urbo, kies surda komunumo estis unu el la plej gravaj. Pierre Desloges priskribas la lingvon, kiu naskiĝis sine de tiu komunumo kaj defendas ĝin kontraŭ la atakoj de tiuj, kiuj kredas ĝin malsupera al la parolaj lingvoj. Li detaligas ĝian gramatikon kaj elmontras ĝian riĉecon, al kiu mankas nenio de la parolaj lingvoj. En tiuj jaroj, tiu ĉi lingvo ekdisvastiĝis kaj baldaŭ federis la surdan komunumon ĉirkaŭ si. Pro homo, kiu fondis en la jaroj 1760aj la unuan surdulan lernejon : abato De l'Epée.

La “patro de la surduloj”

Tiel oni ofte prezentas abaton De l'Epée, tiel granda estis lia pionira rolo. Antaŭ turniĝi al instruado de surduloj, De l'Epée estis religiisto elpuŝita de la eklezio pro sia inklino al jansenismo. Li trovis sian novan alvokiĝon nur malfrue, en cirkonstancoj kiujn li klarigis poste.

Iam, dum unu el siaj kutimaj pastraj vizitoj al la loĝantaro de sia kvartalo, li eniris domon kie troviĝis du junaj ĝemelinoj, sidantaj kaj brodantaj. Ŝajne ne rimarkintaj la envenon de vizitanto, ambaŭ junulinoj silente daŭrigis sian okupiĝon... ĝis envenis la patrino, kiu tiam klarigis al la abato, ke ili estas denaske surdaj. Kortrafite, De l'Epée volis helpi tiujn junulinojn kaj ekinstruis al ili la katekismion. El tiu unua sperto, li decidis fondi instituton en la kvartalo de Sankta Jakvo, kies instruo estis ĉefe religia, sed ankaŭ ĝenerala.

Forlasinte la metodojn de la edukistoj kiuj unue strebis paroligi, De l'Epée estis la unua aŭdanto praktikanta instruon per la signolingvo. Li rapide ekkonsciis pri la neceso de tiu lingvo por efike klerigi la surdulojn, kaj kontraŭe al ofta kredo, li ne elpensis ĝin sed lernis de la surduloj mem. Tamen, li opiniis ĝin ne egala al la parola lingvo, kaj li elpensis sistemon de “metodaj signoj” kiu laŭvorte imitis la skriban francan, por pli facile lernigi ĝin. Post lia morto, tiuj “metodaj signoj” estis forlasitaj pro sia troa pezeco kaj malnatureco.

La impeto de la surda kulturo

De l'Epée mortis en la unuaj tempoj de la Franca Revolucio, sed Sankta Jakvo daŭre ekzistis ĝis hodiaŭ. El ĝi eliradis lernantoj kun klereco super la mezuma. Komence de la 19a jarcento, la novulojn instruas, inter aliaj, surdaj instruistoj el la unua generacio. La plej elstara tiama figuro estas Jean Massieu, kiu



Des photos de Boulogne-2005 sont visibles sur <http://esperanto-jeunes.org/galerie/>

estis paŝtisto antaŭ esti lernanto kaj instruisto en Sankta Jakvo. Inteligenta kaj tre klera, Massieu skribis lerte en la franca kaj gajnis al si la estimon eĉ de la aŭdanta intelektularo. Li fariĝis simbolo de la sukceso de Sankta Jakvo, kaj la voĉo de la surduloj de sia tempo.

La famo de Sankta Jakvo rapide transiris la landlimojn, kaj en la unuaj jardekoj de la 19a jarcento, institutoj laŭ ĝia modelo estas fonditaj ĉie en Eŭropo. La surda kulturo ekfloris meze de la 19a jarcento kun la kreado de asocioj, la aktivado de verkistoj, pentristoj, poetoj kaj fabelistoj en signolingvo.

De Eŭropo tiu movado disiras en aliajn partojn de la mondo. En Ameriko, la unuan surdulan lernejon kreis en 1816 Thomas Gallaudet kaj Laurent Clerc, ekslernanto de Massieu enmigrinta. Clerc pasigis la reston de sia vivo en Usono kaj kiam li mortis en 1869, multaj institutoj estis dissemataj tra la kontinento. La nordamerika signolingvo (NASL), parolata de Kanado ĝis Meksiko, estas parenca al la FSL pro la influo alportita de Clerc (pli ol 40 % de ilia signaro estas komuna).

Tamen, malgraŭ tiu impeto, la signa instruado estis jam pridubita kaj minacata de kontraŭa skolo kiu disvolviĝis siavice meze de la 19a jarcento. Temas pri la parolismo.

La parolisma batalo

Aperinta jam de la 17a jarcento, la parolismo konsideris la instruon de liplegado kaj parolo kiel solan rimedon por eduki la surdulojn, kaj ignoris la signolingvojn. Kiel facilas imagi, tia rezulto atingeblis nur post plurjara konstanta kaj pena laboro. Krome, tiu longa dresado ofte fiaskis malgraŭ ĉiuj streboj. La rezulto ĝenerale estis ne sufiĉe bona por profiti al la unua koncerno, la lernanto. La unuaj profitantoj de tiu metodo estis la edukistoj, kiuj trovis siajn lernantojn el riĉaj familioj kaj postulis fortan pagon pro sia servo.

La defendantoj de la parolismo klopodis trompi pri la reala valoro de sia metodo, allogante ĉies atenton al la kelkaj maloftaj superdotitoj, kiujn ili sukcese paroligas. Sed ili sin detenis precizigi ke tiuj ĉi ne estas surdaj denaske aŭ eĉ ne profunde....

Meze de la 19a jarcento, la parolismaj lernejoj disvolviĝis paralele al la nun nomitaj "gestismaj" lernejoj kiuj daŭre fidelis al instruado per signoj. En Britio kaj en la germanaj landoj, ili tiom multobligis, ke ili fariĝis pli multaj. Tiun fortan progreson klarigas interalie la monaj subtenoj, kiujn trovis la parolistoj en la riĉaj klasoj, dum la surduloj apenaŭ povis kalkuli je si mem.

La unua celo de la parolistoj estis la signoj, kiujn ili kondamnis kiel ĉefan baron al la

lernado paroli. Tiel longe ke signos la surduloj, pensis la parolistoj, ili ne povos lerni paroli : endis do malpermesi al ili la signojn. En siaj lernejoj, la parolistoj punis la infanojn, kiujn ili kaptis signantaj, ekzemple kunligante iliajn manojn post la dorso.

Ne estas kondamnindaj la parolmetodoj mem : fakte, la gestismaj lernejoj ankaŭ praktikis ilin en kazoj kiam ili povis efiki (t.e. kun infanoj misaŭdantaj aŭ malfrue surdiĝintaj). Kondamnindas la apero de aŭtoritatema tendenco, kiu trudis al la surduloj sian koncepton pri asimilo, neante ilian kulturen specifecon. Unu el la plej okulfrapa karaktero de tiu movado estas, ke ĝin konsistigis preskaŭ nur aŭdantoj kiuj komune dividis profundan malestimon pri la signolingvoj kaj degneman patronismon al la surduloj. Pli ol kverelo pri metodoj, temis pri konflikto kun ideologia fono. Kie vidis la parolistoj nur handikapulojn, kiuj nepre devis adaptiĝi al la socio por ĉia prezo, tie vidis la gestistoj personojn rajtantajn normalan edukon per sia natura lingvo.

La Milana kongreso

La finpunkto de tiu konflikto alvenis en 1880, dum internacia kongreso en Milano, kien kunvenis reprezentantoj de multaj institutoj el Eŭropo kaj Ameriko. Tiu kongreso finiĝis deklare la malpermeson de signolingvoj en la edukado de surdaj infanoj. Preskaŭ ĉiuj kongresanoj estis aŭdantoj... ilia venko estis daŭranta jarcenton. Pri la opinio de la surduloj ili ne interesiĝis ĉar, kiel bonege resumis parolista kuracisto, "de kiam oni demandu al malsanuloj pri la speco de kuracilo kiu taŭgas al ili?"

Tio estis vera katastrofo por la surda komunumo. Ĝiaj tujaj konsekvencoj estis maldungo de la surdaj instruistoj kaj ilia anstataŭigo de aŭdantoj. La paroliga metodo fariĝis la sola akceptita kaj la signolingvoj trovis rifuĝejon nur en sekreteco ekster la klasĉambroj. Al la FSL, tiu daŭra altrudita sekreteco kaŭzis malpliriĉigon kaj disflankigon en lokaj variantoj. Al la surduloj, ĝi kaŭzis rimarkeblan malprogreson de ilia edukiteco, kaj faktan ekskluzivon el la pli kleraj profesioj. Antaŭ Milano, eblis esti surda kaj fariĝi ekzemple ĵurnalisto, instruisto, verkisto, sciencisto, ktp... Ekde tiam, la devigita lernado de la parolo forrabis tro multan tempon por ebligi efikan edukigon.

Triumfinte en Eŭropo, la parolismo trudis sin ankaŭ en Ameriko post dudek jaroj.

La situacio ekde la jaroj 1970aj

Post jarcento sen notinda ŝanĝiĝo, la situacio ekevoluis pli favore. En la fluo de la kontestema movado de la jaroj 70aj, la premo de la surda komunumo por rekono de sia lingvo pligrandiĝis. Ili postulas la rajton elekti la edukon, kiun ili opiniis pli oportuna al si.

La progresoj estis pli rapidaj en kelkaj landoj kaj, hodiaŭ, la situacio mondscale ankoraŭ ne estas egala. En norda Ameriko kaj norda Eŭropo, la signolingvoj estas bone enkondukitaj en la normalan eduksistemon, kaj sufiĉe bone agnoskitaj en ĉiuj medioj. La universitato Gallaudet de Vaŝingtono estas la ununura ekzemplo de universitato kies kursoj, profesoroj kaj studentoj uzas la nordamerikan signolingvon (NASL).

En Francio, la malpermeso de la FSL estis fine nuligita en 1975. Post tridek jaroj, la aplikata eduksistemo estas ĉefe dulingva "FSL / franca skribe-parole" kaj okazas en la "integrigaj klasoj", kiujn disponas iuj bazaj kaj mezaj lernejoj de ĉiu edukdistrikto. Sed la nacia eduksistemo ankoraŭ estas fermita al la surdaj instruistoj ; surduloj intervenas en klaso nur kiel helpantoj de aŭdantaj signantaj instruistoj. La publiko ankoraŭ ne estas sufiĉe informita pri la signolingvoj kaj la aŭdantoj ĝenerale timas ke signa

instruado malutilos al siaj infanoj. Malprave, ĉar la parola instruado ofte kondukas al lerna malsukceso.

La politiko daŭre estas avara pri la rimedoj al efika instruado kaj helpado de la surdularo. La situacio de la profesiaj interpretistoj estas sufiĉe klariga pri tio : ili mankas grandege kaj ilia servo estas kosta ĉar ne sufiĉe repagata de la ŝtato. Al surda persono, eĉ banala peto al administracio estas problema, se tiu ne disponigas interpretiston.

La problemojn, kiujn renkontas surdulo, plej ofte kaŭzas ne la surdeco mem sed la aŭdantoj. En socio, kie la aŭdantoj – aŭ eĉ parto – kapablus signi, la surduloj ne estus handikapuloj. Espereble tio, kion vi legis, dezirigos al vi ekkoni pli pri la mondo de la surduloj kaj ilia miriga lingvo.

Por scii pli :
 – pri la historio de surduloj: Quand l'esprit entend, Harlan Lane, éd. Jacob, 1984.
 – pri ilia kultura: Les sourds, c'est comme ça, Yves Delaporte, Maison des sciences de l'homme, 2002.
 – interesa dokumentaro, en DVD: Le pays des sourds, régisoris Nicolas Philibert, 1992.
 – adreslibro de la surdulaj asocioj kaj institutoj en Francio: La France des sourds, kolektivo, éd. Monica Companys, 2000.
 Rigardu ĝian kovrilon: estas Esperanto !

Signolingvo : kiel funkcias ?

Oni ofte imagas ke ekzistas unu tutmonda signolingvo, sed vere ili tiel diversas kiel la parollingvoj. Krome, ne nepre ekzistas rilato inter la lokiĝo de la signolingvoj kaj tiu de la parolaj. Ekzemple, FSL (franca signolingvo) estas parolata en la tuta franca teritorio sed ne en Belgio nek en Kebeko kie troviĝas aliaj. Cetere, NASL (nordamerika signolingvo) estas parolata en Meksiko same kiel en Usono. La kredo pri ununura signolingvo ofte venas de tiu alia, ke oni elpensis ĝin kiel Esperanton....

En Francio, FSL-n scipovas ĉirkaŭ 200.000 personoj, inter kiuj oni trovas 80.000 surduloj. FSL dividas kun la parolaj lingvoj multajn trajtojn. Ĝi enhavas arkaismojn kaj neologismojn: iuj signoj eksmodiĝas kaj fine malaperas dum aliaj naskiĝas. Lingvoniveletoj ne forestas: estas signoj pli ĝentilaj, kun aliaj pli familiaraj, slangaj, aŭ fiaj. Eĉ estas regionaj akĉentoj : oni signas ne tute same en Parizo kiel en Tuluzo! Ne mankas propra kulturo al tiu lingvo, kiu havas poezion, fabelojn, teatraĵojn, kaj sian propran humuron.

- Por kompreni kiel funkcias FSL, oni memoru ke ĝi baziĝas sur pensmaniero tute alia al tiu de la aŭdantoj. La surduloj ĝin nomas "vida pensmaniero". Tial oni ne povas ilin priskribi parolante pri "konjugacio", "substantivoj", "adverboj", ktp.... Tamen temas pri klara gramatiko kun ties reguloj. Jen kelkaj punktoj – tre resume !

- En ĉia parola lingvo, la elementoj sekvas unu la aliajn kiel vagonoj de trajno. Ilia gramatiko estas lineeca. La signa gramatiko estas tridimensia kaj dank' al tio ĝi povas transdoni plurajn informojn samtempe. La direkto de signo ofte estas sencoplena: ekzemple, la frazo "mi demandas al ŝi/li"

bezonas nur unu signon direktitan al la priparolata persono. Ankaŭ la esprimoj de la vizaĝo gravegas por distingi demandon el aserto, aŭ plinuancigi (ekzemple, la signo "ĝoja" fariĝas "ĝojega" aŭ "ĝojeta" kun taŭga vizageprimio).

- Kiam oni paroladas pri forestantoj, oni unue nomas ilin donante al ĉiu ties lokon en la spaco inter la signantoj. Poste, oni nur bezonos montradi tiujn lokojn por komprenigi pri kiu(j) oni parolas.

- Konjugacio kompreneble ne estas. Se bezone, oni indikas la momenton de la ago per la "tempolinio". Tio estas abstrakta linio perpendikla al la signanto: ĉe si la estanteco, malantaŭe la estinteco, kaj antaŭe la estonteco.

- Normala signifrazo obeas al ordo logika laŭ la vida pensmaniero : unue la scenejo de la ago (loko kaj tempo), poste la aktoroj (subjektoj), kaj fine la ago mem. La frazo "mia fratino ludas en la ĝardeno" estos prefere signita "ĝarden(e)/ fratino/ mia/ lud(as)".

- Por nomi personon aŭ lokon, oni povas uzi la manalfabeton; sed la surduloj uzas apartan nomsignon por siaj konatoj aŭ la ĉefaj lokoj (landoj, gravaj urboj, ktp.). Por la personoj, tiuj nomsignoj ordinare venas el iu trajto aparte rimarkinda ĉe ili: ties alteco, aŭ vizaĝo, aŭ iu morala karaktero, ktp. Sian nomon oni ricevas por ĉiam eĉ se malaperas la trajto kiu inspiris ĝin.



Christophe Chazarein


Jen kiel signi litero post litero la vorton "esperanto":



Gestuno: ĉu Esperanto de la signoj ?

Jam en la jaroj 1950aj, la demando pri internacia signolingvo estis diskutita dum la unua kongreso de la Monda Federacio de la Surduloj (MFS). En 1972, MFS komisiis la ellaboradon de la estonta internacia signolingvo al komisiono. La fakto, ke la ĉefa organizo reprezentanta la surdulojn mem traktis tiun problemon, estas rimarkinda. La surduloj tiel montras sin multe pli akceptemaj ol la aŭdantoj, kiuj daŭre rifuzas solvon al la internacia komunikado per artefarita lingvo.

La komisiono prezentis la novbakitan projekton en 1973, kun la nomo "Gestuno". Ĝi konsistas el 1500 bazaj signoj, ĉerpitaj en diversaj signolingvoj aŭ elpensitaj, kiuj respondas al la plej kutimaj bezonoj. Oni zorgis elektis la plej elvokivajn kaj bildecajn signojn, por ke ili estu facile rekoneblaj kaj lerneblaj. Gestuno ne havas difinitan gramatikon: oni rajtas uzi tiun de ĉia signolingvo. Pro tio, kelkaj argumentas ke Gestuno ne estas vera lingvo sed nur limigita signaro.



gestuno-simbolo

Ĉu tio veras aŭ ne, oni ja devas agnoski ke Gestuno ne ekuziĝis ekster la margenoj de gravaj internaciaj eventoj (kia la kongreso de MFS). Sed tion komprenas sen peno tiu, kiu konas la eksterordinaran kapablon de la surduloj interkompreniĝi spite al ĉiuj lingvaj baroj. Surdulo vojaĝanta eksterlanden adaptiĝas al la loka signolingvo post apenaŭ kelkaj tagoj. Ĉu internacia signolingvo estas vere bezonata en tiaj kondiĉoj ?

Christophe Chazarein

Esperantismoj

«**Facila lingvo, logika, liberigita de la pezo de idiotismoj, ekzakte kion riproĉis al ĝi Faik Konitza**»

Tio estas unu el kritikoj de albana intelektulo, skribita en 1904!!, laŭ libro «Le Phalanstère des Langages Excentriques» de Stéphane Mahieux. Tute falsa argumento kontraŭ Eo, ĉar fakte en ĝi ekzistas kelkaj idiotismoj! sen ke ili tro malfaciligu la lingvon, des pli ke feliĉe ili ne tro multas.

Antaŭ ĉio, tre gravas difini la ŝlosilvortojn de la artikolo, por scii ekzakte, pri kio temas.

1. Laŭ la Reta Vortaro, idiotismo = Nelogika aparta vortokonstruo, propra al iu lingvo sed ne al aliaj: ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj nemultaj idiotismoj; Z. lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva kaj tro peza. Z.

Kaj: «idiotismo povas resti kiel esperantismo, se ĝi nur estos komune akceptata.» Z.

2. Idiotismo estas nelogika aparte vortokonstruata esprimo, kaj kiu fariĝas komprenebla per la efiko de interkonsento. Estas idiotismo se, - anstataŭ diri "jam estas multa tempo", - oni dirus "jam fariĝas multa tempo".

-Ordinare lingvo obeas regulojn, ĉefe la leĝon de analogio, kaj fariĝas nelogika, okaze de deflankiĝoj.

-Nuance, gramatika escepto estas simpla deflankiĝo de la lingvaj leĝoj, dum idiotismo tendencas al pli gravaj deflankiĝoj, enkadre de la lingvistiko mem, kaj foje ankaŭ de la logiko.

3. Takse. Per multobligo de idiotismoj, la etnaj lingvoj fariĝas malfacilaj por la lernado. -Pro tio, artefarita lingvo, kiam estas destinita al la universala uzo, devas kiomeble eviti idiotismojn, almenaŭ en la nuna stato de la homaro.

-Idiotismoj estas pli akcepteblaj en naciaj lingvoj, ol en lingvo internacia, ĉar enkadre de la naciaj limoj, kelkaj idiotismoj pli facilas, ol en monda skalo.

-Aliflanke, idiotismoj, en certaj cirkonstancoj, havas la apartan kapablon riĉigi la esprimon. «Lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva kaj tro peza» (Zamenhof). -Kiel sciate, la planado de Esperanto, fare de Zamenhof, fariĝis, nek kun tro da logiko, nek kun maltro, sed atenta al antropologia situacio.

Esperantismo (Z):

1. Penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa (Z).

2. Dirmaniero speciala al Esperanto: tiu formo jam de tre longe uzata fariĝis esperantismo (Z).

Aliaj Eo-specifajoj:

Aligi, Aliĝilo

Ĉu

Ki-vortoj

Idiotismo: idealisma filozofio por plibonigi la mondon, postulanta, ke ĉiuj adeptoj havu inteligento-kvocianton je malpli ol 70, kaj parolu Esperanton.

Esperantaj vortoj en Esperanto

Ne ĉiuj vortoj de Esperanto havas signifon rekte diveneblan pere de aliaj lingvoj. Kelkaj el ili estas Esperantaj idiotismoj indiĝene naskitaj en Esperantujo, ĉu pro zamenhova kaprico, ĉu pro natura lingvevoluo inter la parolantaro.

Laŭforme (rimarku, ke la listo enhavas mikse vortojn tute kutimajn kaj vortojn foje uzatajn sed neoficialajn):

aligilo, edzo, espo (slango por Esperanto), ĝi, kabei, nifo (laŭ angla UFO), pli, plej, ujo, zamenhova.

Oni ankaŭ povus aldoni la tabelvortojn.

Foje oni trovas la vortojn aliel, alies, -iĉ-, kaŭ (= kaj + aŭ), kaj ri, sed ili ne konformas al la reguloj de la Fundamento. Temas ĉe ili aŭ pri nekonsciaj pekoj kontraŭ la reguloj aŭ pri intencaj reformprojektoj.

Laŭsignife:

aligatori, fundamento, memzorganto, necesejo, kajmani, krokodili, krokodilo, fina venko, verda, verdo

Reptilumi

Reptilumi estas Esperanta idiotismo kun la signifo «krokodili, aligatori aŭ kajmani». Ĝi tamen estas ege malofte uzata, ĉar kutime oni simple uzas krokodili anstataŭe.

Krokodili, aligatori, kajmani, lacerti, gaviali

Krokodili

Krokodili estas Esperanta idiotismo kun la signifo «en Esperanta medio paroli lingvon kiu estas la gepatra lingvo de ĉiuj ĉeestantoj». Por similaj trajtoj ankaŭ ekzistas la vortoj aligatori kaj kajmani. Kelkfoje la vorto krokodili estas uzata kun pli ĝenerala signifo de «krokodili, aligatori aŭ kajmani». Malofte oni tiam ankaŭ uzas la vorton reptilumi.

Krokodilado estas ĝenerale malakceptata inter esperantistoj. Oni volas eviti ĝin por pli bone praktiki Esperanton, por ke oni povu bone uzi ĝin, kiam oni vere bezonas ĝin, parolante kun eksterlandanoj. Homoj, kiuj nur malofte povas vojaĝi eksterlanden, alikaze preskaŭ neniam havus la eblecon praktiki sian Esperanton. Dum internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, krokodilado povas kaŭzi nekomprenon, kaj tial estas eĉ malpli akceptata ol en kunvenoj de samlandanoj. Aldone, krokodilado povas kaŭzi malbonan impreson al vizitantaj ĵurnalistoj aŭ aliaj eksteruloj ĉe la aranĝoj, ĉar ili povus pensi ke per Esperanto oni ne povas bone esprimi sin. Ĉiuj-ĉi kialoj kune igas la krokodiladon malakceptata inter esperantistoj, tiel ke ili ofte instigas homojn paroli Esperanton, eĉ se tiuj ne absolute necesas por rektaj komunikaj kialoj.

Tamen, foja krokodilado kun komencantoj por klarigi gramatikajn detalojn estas pli akceptata. Sed multaj preferas alparoli komencantojn per simpla, malrapida Esperanto, por ke ili baldaŭ plibonigu sian lingvoscion.

Paroli en fremdlingvo por plibonigi sian scion de alia fremdlingvo en Esperanto-aranĝo estas iom pli akceptata trajto. Vidu pli ĉe aligatori. Etimologio

Pri la etimologio de la esprimo krokodili oni ne certas. Tamen ekzistas pluraj klarigaj teorioj:

-Onidire krokodiloj ploras manĝante viktimojn. Analoge, krokodilanto plendas pri la fato de Esperanto, sed mem kontraŭefikas ĝin.

-La uzon de «krokodilo» por slange indiki neesperantiston enkondukis la italdevena Ferrari, taksisto en Parizo dum la 1930-aj jaroj.

«Kion volas tiuj krokodiloj?» li kutime apostrofis la neesperantistojn, kiuj brue envenis la kafejon kie li estis babilanta en Esperanto kun samideanoj. Ankoraŭ nun kelkfoje «krokodilo» sinonimas al neesperantisto. Tamen, pli ofte ĝi signifas «Esperanto-parolanto, kiu en Esperanto-medio parolas nacilingve».

-Alia klarigo de «krokodili» devenas el la «Cseh» instruado. Kiam Andreo «Cseh» instruis, li ĉiam kunportis lignajn bestojn. Dum liaj kursoj neniu rajtis paroli sian gepatran lingvon, krom se tiu havis la krokodilon en la mano.

Diversaj difinoj

Homoj havas diversajn opiniojn pri la difinoj de la reptilaj vortoj - baze temas pri tio, ke homo parolas alian lingvon ol Esperanton en Esperanto-medio:

Artikolo legebla ĉe <http://www.tejo.org/vikio/Esperantismoj>

Aleks Kadar



Pri idiotismoj en

esperanto:

« Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tian anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion ĉi fari tute oportune; sed en okazo, se ni por ia idiotismo ne trovos pli bonan esprimon pure logikan, tio ĉi ne devas nin ĉagreni; kaj la idiotismo povas tute oportune resti kiel «esperantismo», se ĝi nur estos komune akceptata. »

el «Lingvo Internacia», L.L. Zamenhof, 1905, p.545

«Kion volas tiuj krokodiloj?» li kutime apostrofis la neesperantistojn, kiuj brue envenis la kafejon kie li estis babilanta en Esperanto kun samideanoj. Ankoraŭ nun kelkfoje «krokodilo» sinonimas al neesperantisto. Tamen, pli ofte ĝi signifas «Esperanto-parolanto, kiu en Esperanto-medio parolas nacilingve».

-La uzon de «krokodilo» por slange indiki neesperantiston enkondukis la italdevena Ferrari, taksisto en Parizo dum la 1930-aj jaroj.

«Kion volas tiuj krokodiloj?» li kutime apostrofis la neesperantistojn, kiuj brue envenis la kafejon kie li estis babilanta en Esperanto kun samideanoj. Ankoraŭ nun kelkfoje «krokodilo» sinonimas al neesperantisto. Tamen, pli ofte ĝi signifas «Esperanto-parolanto, kiu en Esperanto-medio parolas nacilingve».

-Alia klarigo de «krokodili» devenas el la «Cseh» instruado. Kiam Andreo «Cseh» instruis, li ĉiam kunportis lignajn bestojn. Dum liaj kursoj neniu rajtis paroli sian gepatran lingvon, krom se tiu havis la krokodilon en la mano.

Diversaj difinoj

Homoj havas diversajn opiniojn pri la difinoj de la reptilaj vortoj - baze temas pri tio, ke homo parolas alian lingvon ol Esperanton en Esperanto-medio:

Maniac Mansion Deluxe - en esperanto

Klasika komputila ludo nun disponeblas en Esperanto

James Vasco Milanez



Elsuto:

La paĝaro de la skipo, «LucasFan Games», troviĝas ĉe: http://people.freinet.de/lucasfangames/index_eng.htm
Iru al «Our Games», kaj poste elektu «Download» sub «Maniac Mansion Deluxe».

Antaŭ iom pli ol 15 jaroj, estis lanĉita la ludo Maniac Mansion («frenezaj domo»), kiu popularigis novan ludstilon kaj arigis legion da fanoj ĉirkaŭ la mondo. Pasintjare, internacia volontula teamo relanĉis la ludon, nun kun pli ellaborita grafiko kaj rulebla en modernaj komputiloj, «Maniac Mansion Deluxe».

Intertempe, pli ol 400.000 personoj jam elŝutis la novan version (senpagan), kaj kiu estas ade tradukata en novajn lingvojn: nun, ĝi estas disponebla ankaŭ en Esperanto!

En MM, la ludanto interagis kun roluloj kaj objektoj, kadre de pluraj malgrandaj sinsekvaj enigmoj, kiuj devas esti kohere solvitaj cele al la fina tasko: savi la koramikinon de la ĉefa rolulo, enkarcerigitan de freneza sciencisto. Oni gvidas skipon de tri studentoj tra lia domo, interagante per komandoj («prenu», «malfermu»,

«fermu», «puŝu», ktp) kaj dialogoj, kiuj donas indikojn pri la solvo de la enigmoj. Vi eltrovos, ke ĉiu el la sep elekteleblaj junuloj havas specifajn lertojn, talentojn kaj malfortojn, kaj ĉiu el la frenezaj loĝantoj de la domo havas celojn kaj dezirojn kiuj povos helpi aux bloki vian skipon, depende de kiel vi rilatas al ili. La historio - kaj via alirmaniero por plenumi la celon - estos malsamaj laŭ la knaboj kiujn vi elektas kaj kiel vi interagis kun la personoj kaj aĵoj en la domo... Longaj horoj da alloga cerbumado atendas vin! ;-)

Pro la ampleksa teksta interagado sur grafika interfacio, la ludo estas plaĉa rimedo por praktiki lingvajn talentojn. Ĝi estas bona amuzaĵo kaj por progresintoj, kaj por progresantoj; la grafika interagado ebligas ke eĉ komencantoj ĝuu la ludon, samtempe ĉerpante sufiĉe ampleksan vortprovizon.

Zorgu pri novaj idealistoj

Recenzo

Originala muziko en esperantio ege mankas. Jen, la malapero de la Dolcxamar' en 2002 altigis la krizon. La grupo estis eta perlo en granda dezerto de malentuziasmigaj produktaĵoj, ĉefe ĉe la flanko de elektronikaj muzikoj. La grupo pruvis unue, ke estis publiko por tia muziko. Dolcxamar' umis kiel subgrunda elektra stranga muziko. Rapide Dolcxamar' iĝis ege populara ĉe la junuloj. Sed malgraŭ tio malaperis rapide la grupo post unu albumo, Lingvo intermonda, kaj kelkaj koncertoj, notinde KEF, KAFE kaj IS en 2000. Ankaŭ restis la partopreno al elektronika kompilo kun du novaj kantoj (2002). Kaj jen nenion plu.

En 2004, koncerto estas anoncita en IJK en Svedio; grupo: DolcHamar!? Jes fakte, ĉu vi rimarkis? Anstataŭ tiu X estas nun H. Ĉu eble Pieĉjo trolegis esperantistajn forumojn kaj estis konvinkita pri la neceso reveni al fundamentaĵo? Aŭ ĉu la neesperantista publiko plendis, pro ke Dolsksamar ne prononceblas? Nek unu nek la alia. Alia grupo formiĝis ĉirkaŭ Pjeĉjo, alias Patrik: la ĉefa esperantulo el antaŭa bando.

« Rebela sono »

Kiel bona fanatikulo, mi tuj aĉetis la diskon. Mi iom estis malfeliĉa: la grupo tute ŝanĝiĝis, estas multe pli rokpopa disko.

« Re-bela »? Alimaniere tiu-ĉi disko, ekzemple estas multe pli da realaj instrumentoj, eĉ gitaro, laŭdire ĉi-foje Dolchamar pli koncertindas, ilia spektaklo en KAFE estis « Kiel oni anstataŭigis H per X »... ĉu tiu E per I signifus ke Dolchamar estas ne plu « ribela »?

Tamen ne unue strangaj paroladoj restas « Jen hopitash... » kun granda averto en la albumo : « La esperanto ne estas korekta ». Se legendo pravas: tekstoj de Dolcxamar estis skribitaj subinflue de alkoholaĵo, sed pri tiuj de Dolchamar', certe temas pri pli forta drogo. Konsilo de Levina pri fungoj eble estis uzata (vidu intervjuon fare de Levina en iu JI de 2003). Pri la enhavo de la tekstoj, nu, ĝi estas daŭre ege amuza: inter abstrakto kaj idealo.

Pri la sono

Muziko iom malplaĉis al mi, sed oni bezonas plurfoje aŭskulti por kompreni. Objektive oni povas konstati, ke ili vere laboras por krei tian sonon. Melodio tranĉita per vigla ritmo sendube denove faros sukceson en diskejoj de renkontiĝoj same kiel la klasikaĵo « ĉu vi pretas ? ».

Platano

¹ Vidu la akademion de Esperanto



Cuisine à l'espéranto

Chaque mercredi a lieu un cours d'espéranto à Massongy (Haute-Savoie). Pour changer le quotidien habituel d'un cours, nous avons décidé de nous réunir pendant les vacances de Noël pour utiliser l'espéranto en s'amusant. Les trois élèves (Anaïs, Michel et Paloma) ont pu découvrir quelques recettes écrites en espéranto, les comprendre et les mettre en oeuvre le jour même.

Après avoir cuisiné, ils aimeraient vous faire partager cette merveilleuse expérience de découverte d'une langue à travers la cuisine.

Adélaïde.

Si vous voulez enchanter vos repas pour petits et grands, servez de l'Espéranto sur plateau.

Porsciura Detranĉajetaro


En entrée, vous vous régalez d'une salade faite avec beaucoup d'amour.

En plat principal, nous vous conseillons une délicieuse tarte aux poireaux que vous dégusterez sans modération.

Ĉokoladaj Kuketoj

Vous ne pourrez résister à leur parfum chocolat, ainsi qu'à leur odeur alléchante. Oubliez vos kilos en trop, et n'hésitez pas à en reprendre.

Michel



JEFO-estraro / bureau d'Espéranto-Jeunes

Prezidanto Axel Rousseau	45, rue de Sully 92100 Boulogne Billancourt	tél. : +33 6 63 70 11 32 axel@esperanto-jeunes.org
Vic-prezidanto Sébastien Merlet	4, route de la Raimbaudière 41800 Houssay	tél. : +33 6 77 37 49 88 sebeto@esperanto-jeunes.org
Kasisto (et relations TEJO) Sébastien Montagne	43, place Drouot 45140 St Jean de la Ruelle	tél. : +33 6 60 66 48 02 sebastien@esperanto-jeunes.org
Sekretario Aleks Kadar	13, av. de Wagram 75017 Paris	tél. : +33 1 44 09 84 39 aleks@esperanto-jeunes.org
Vic-sekretario Cyrille Poulet	103, av. Verdier 92120 Montrouge	tél. : +33 6 77 28 13 25 cyrille@esperanto-jeunes.org

JEFO-komitato / conseil d'administration d'Espéranto-Jeunes

Flavie Audibert <i>Culture</i>	31, rue Denis Papin 31500 Toulouse	tél. : +33 6 61 58 60 80 flaviewakako@yahoo.fr
Christophe Chazarein <i>Rédaction JI</i>	app. 103, bât. D / 200, rue Ursule Devals 82000 Montauban	tél. : +33 6 33 93 92 81 christophe@esperanto-jeunes.org
Isabelle Clopeau	6, rue J-P Calloc'h 22000 St-Brieuc	tél. : +33 6 73 34 15 49 zabbou@ifrance.com
Ludvine Delnatte	78, av. De Suffren 75015 Paris	tél. : +33 6 64 65 43 19 lulu@esperanto-jeunes.org
Mélaine Desnos	64, rue Gabriel Péri 93400 St-Ouen	tél. : +33 1 40 11 31 87 melaine@esperanto-jeunes.org
Benoît Fonty <i>Coordination FESTO</i>	10, rue Bonne Louise 44000 Nantes	tél. : +33 2 40 69 48 95 benoit@esperanto-jeunes.org
Maïté Gayet	Les Vignes 01310 Montcet	tél. : +33 4 74 24 23 13 maitochette@hotmail.com
François Hoeltzli	Barlachstr. 16 DE-80804 München (Allemagne)	tél. : +49 175 603 5678 hoeltzli_frz@rocketmail.com
Tatyana Malazh	4, rue Florence Blumenthal 75016 Paris	tél. : +33 6 33 84 06 33 tania0282@yandex.ru
Mickaël Ponsardin	282, av. Berthelot 69008 Lyon	tél. : +33 6 75 07 52 69 mikaelp@free.fr
Tiphaine Rabineau		tifen@esperanto-jeunes.org
Gérald Tibi	8, rue Jeu Goujon 31500 Toulouse	getibi@yahoo.fr

Regionaj kunordigantoj / Coordinateurs régionaux

Maïté Gayet <i>Ain</i>	voir JEFO-komitato	
Violette Walther <i>Alsace</i>	12 A, rue Jean-Henri Schnitzler 67000 Strasbourg	tél. : +33 8 71 74 68 15 walther.violette@wanadoo.fr
Magali Lajus <i>Aquitaine</i>	1, les Places 33910 Sablons	magalilajus@yahoo.fr
Pierre Gontier <i>Basse-Normandie</i>	La Huardière 50540 Isigny	tél. : +33 2 33 48 04 67 pierregontier@netcourrier.com
Vincent Pacheu <i>Bouches-du-Rhône</i>	Vallon de la Tour de Keyrié 13100 St-Marc-Jaumegarde	tél. : +33 4 42 24 95 83 mpacheu@libertysurf.fr
Sébastien Erhard <i>Bretagne</i>	36 B, rue de la Corderie (p. 15) 22000 St-Brieuc	tél. : +33 6 15 21 48 93 ou +33 2 96 68 55 21 henri@esperanto-jeunes.org
Alain Droyer <i>Côtes d'Or</i>	14, rue Maxime Guillot 21240 Talant	tél. : +33 3 80 55 68 83 alain.doyer@esperantoland.org
Xavier Dewidehem <i>Nord-Pas-de-Calais</i>	1, allée de l'Archerie 59800 Lille	tél. : +33 3 20 04 12 15 ou +33 36 75 60 14 75 dewidehem@lve-esperanto.com

Coordinateurs départementaux, urbains et contacts

Axel Rousseau <i>Boulogne Billancourt</i>	voir JEFO-estraro	
Thomas Genty <i>Bourg-en-Bresse</i>	961, chemin de Corneloup Valuisant le Bas 01250 Villereversure	tél. : +33 4 74 30 60 89 pierregenty@planetis.com
Cyrille Poulet <i>Hauts-de-Seine</i>	voir JEFO-estraro	
Céline Bernard <i>Orange</i>	Résidence Lou Mistran (p. D) 74, av. Rodolphe d'Aymard 84100 Orange	tél. : +33 6 30 97 23 88 ou +33 5 96 69 55 80 celine.bernard@esperanto-jeunes.org
Emmanuel Villalta <i>Paris (contact)</i>	4, rue Florence Blumenthal 75016 Paris	tél. : +33 1 45 27 42 35 ou 08 70 06 26 86 manu@esperanto-jeunes.org
Laurent Vignaud <i>Pays de la Loire (contact)</i>	3, allée du Haras (app. 132) 49100 Angers	tél. : +33 2 41 20 19 40 laurent.vignaud@wanadoo.fr
Rose Sanz <i>Val-de-Marne</i>	63, rue André Tessier 94120 Fontenay-sous-Bois	tél. : +33 1 48 73 57 72 R sanz@esperanto.org

Autres coordinateurs

Cours Internet : Ingrid Malaquin (ingrid@esperanto-jeunes.org) et Emmanuelle Richard (emmanuelle@esperanto-jeunes.org)

BEMI - Cycliste : Xavier Godivier : xgodivier@esperanto.org / tél. : +33 1 39 65 39 81

Recettes des weeks-ends gourmands : Rozenn & Clément Picard : rpicard@esperanto.org / tél. : +33 2 23 50 13 35

GASTONO




1



Faites le plein de BD pour l'été !



Franquin
Jidéhem



Serge Sire

Bildaj Deliraĵoj

SUKUBO

epizodo 1: Dom-bestoj



jam
ellitiĝinta ?
ĉu io
urĝis ?

Mi nutru la katojn...
kaj ankaŭ
la orfiŝojn

Stulte !...
Ni ne havas
katojn

nek
orfiŝojn,
cetera !

tio ne
'stas motivo
ilin lasi morti
pro malsato



De tempo al tempo,
zorgu ankaŭ pri mi !

Telefono !

urĝu vin !

kial tiom da hasto ?
kial tiom da hato ?

ne 'stas la
telefono...

mi ne havas
telefonon



vi ja min sekvus
ĝis la mondfino !

sed mi haltos
antaŭe...



DRRRRING!!!
DRRRRING!!!
DRRRRING!!!

la noktoj iĝas
pli kaj pli lacigaj... kaj
la vekiĝoj
ne pli facilas
pro tio...



DRRING !